

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

№ 3 (46) junio 2008



en la numero

Esperantista Primavero en Jekaterinburg

Osmo Buller vizitis Moskvon

50-jara jubileo de esperantiĝo de V.V.Samodaj

trajno "Zamenhof"

aperis ruslingva traduko de "Metropoliteno"

"La urbo Goblinsk" – ĉapitro el la estonta romano de M.Bronŝtejn

"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdoto kaj multo alia

Moskvo, 2008

enhavo:

- 01 *EsPrimo-5: "Kunagi fervore, inspire kaj kore"*
- 02 *"Urala valso" de Mikaelo Bronštejn*
- 03 *VIP en Jekaterinburg*
- 05 *"... Restis nur en la memoro belaj tagoj de printempo"*
- 06 *Versaj impresoj de T. Vŝivceva*
- 07 *Organizanta konkludo*
- 08 *Osmo Buller en Moskvo*
- 09 *Kial – la nova festivalo?*
- 11 *Trajno "Zamenhof"*
- 12 *Al VVS*
- 14 *Datrevena simpozio traktis lingvajn rajtojn*
- 15 *Malferma tago en jubilea etoso*
- 16 *La estraro kunsidis laborege*
- 16 *Saluton, "TEJO aktuale"!*
- 17 *Nekutime abunda IKU en Roterdamo*
- 18 *Novaj REU-membroj por 2008*
- 18 *REU dankas pro la donaco*
- 19 *Kotizoj de REU/REJM por 2008*
- 20 *35 lingvoj prezentitaj dum la dua LF en Peterburgo*
- 21 *Ree kune*
- 22 *IF – la 25-a!*
- 23 *TV-Esperanto en Bialystok*
- 23 *Vladivostokaj esperantistoj gastis en Ĉinio*
- 24 *La 9-a Landa Kongreso de MEF*
- 24 *Anekdotoj*
- 24 *E-klubo en Tverj kaj "Fenestro"*
- 25 *VsPLESk-4 – varma, amata kaj hejmetosa*
- 26 *Literatura konkurso "Liro-2008"*
- 26 *Konatiĝu kun Napolo*
- 28 *Novaj ĉapitroj el la fantasta lernolibro de A. Grigorjevskij*
- 33 *Novaj ĉapitroj el la estonta romano de M. Bronštejn*
- k3 *Aperis ruslingva traduko de "Metropoliteno"*
- k3 *Nova esperantisto en Peterburgo*
- k4 *Nova kanto de Georgo Handzlik*



Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA,
dum la renkontiĝo kun moskvaj esperantistoj
(fotis Valentin Seguru)

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

Nº 3 (46) junio 2008

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Griŝin

*materialoj de REGo povas esti
represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos
senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*

poŝta adreso: Pjatinickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2008:

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj
de KŜŜ – 250 rubloj sendendaj al:*
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва


*por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj
pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*

"Metropoliteno" en "Волна эсперанто"

En 2007 la moskva E-eldonejo "Impeto" lanĉis novan libroserion "Волна эсперанто" (La ondo de Esperanto), en kiu ĝi publikigas ruslingvajn tradukojn de la libroj, originale verkitaj en Esperanto. La unua libro en tiu serio estis la traduko de fama romano de Mikaelo Bronŝtejn "Dek tagoj de kapitano Postnikov" (vidu informon pri ĝi en REGo, № 4 (41), p. 25).

Ĉi-jare en la serio "Волна эсперанто" jam aperis du novaj libroj. La unua, kiu havas la titolon "Эсперанто-движение: фрагменты истории" (Esperanto-movado: fragmentoj de la historio), enhavas du verkojn: "Historio de Sovetrespublikara Esperantista Unio" de Oleg Krasnikov, verkita originale en la rusa, kaj "Historio de Laborista Esperanto-Movado" de Detlev Blanke, tradukita en la rusan de Anatolij Sidorov. La tria, ĵus aperinta, volumo en la serio estas ruslingva traduko de la klasika romano "Metropoliteno" de Vladimir Varankin. Kiel la tradukinto estas indikita A.Aleksandrov, kio, evidente, estas pseŭdonimo. Sendube la ruslingva eldono de unu el la plej famaj E-klasikaĵoj, kiu estos vendata en la plej grandaj librovendejoj de Moskvo kaj kelkaj aliaj rusiaj grandurboj, kontribuos al pli vasta diskonigo de scioj pri E-kulturo kaj la lingvo Esperanto ĝenerale.

La informojn pri la supre menciitaj kaj ĉiuj aliaj eldonaĵoj de "Impeto" eblas trovi en la tt-ejo <www.impeto.ru>.



Garik Kokolija (Moskvo)



***La 08-an de februaro
2008 aperis nova
esperantisto – Jegor
Ciganov, filo de konataj
peterburgaj
geesperantistoj Sveta Ejst
kaj Oleg Ciganov. Li jam
provas paroli, sed
sukcesas eldiri nur ion
similan al "UEA, UEA".
Gratulojn al ĉiuj ili en la
nomo de REGo!***

NOVA KANTO de GEORGO HANDZLIK


Georgo Handzlik, fama pola esperantisto kaj bardo, dum sia vizito al Rusio sukcesis ne nur partopreni en EsPrimo-5. Dum 3 tagoj antaŭ la aranĝo li gastis en Moskvo (kie li interalie koncertis por moskvaj esperantistoj en “Lev Tolstoj”) kaj dum semajno post EsPrimo – en kelkaj uralaj urboj. Rezulte de la vojaĝo naskiĝis lia nova kanto, kies tekston Georgo disponigis por aperigo en REGo.



Esperantistoj rigardas la mondon

Ref: Esperantistoj rigardas la mondon
De sia vidpunkto kaj la
perspektiv',
En urboj vizitas ne ŝtonojn, sed
homojn,
Ja pli ekscitas ol muroj la viv'.

En Moskvo mi vidis la maŭzoleon,
Kaj Parkon Pobedi, Krasnuju
Ploščadj,
Aĉetis matrjoŝkojn kaj vidis Luĵniki,
Promenis ĉe domoj de fama Arbat.
Mi scias, ke en la ŝtupar' de metroo
Maldekstro por iri kaj dekstro por



stari. *Georgo, Galja, Garik, Arina, Raja kaj Saŝa; mankas
Sed pli ol pri preĝejoj, Triumfarko kaj nur Miŝa kaj Svetlana*
Kremlo
Memoros pri Miŝa, Svetlana kaj Garik.

Refreno

Mi scias pri Placo de l' mil naŭcent
kvina,
Ke Sverdlovsk nun estas
Jekaterinburg,
Pri la monumentoj al hom' nevidebla,
Kaj la fondintoj, kaj marŝal' Ĵukov.
Sed mi konservas en mia memoro
Spuron pri homoj feliĉaj kaj gajaj,
Kun grandaj animoj kaj varmaj koroj,
Pri Arina kaj Saŝa, pri Galja kaj Raja.



Refreno

Georgo kaj Mikaelo Bronŝtejn en Jekaterinburg